P. FIRU KAJ S. PRAGANO

RUMANA BONHUMORO

EN ELEKTITAJ RAKONTOJ




ex libris

Andel Boris
20-10-1961

P. FIRU KAJ
S. PRAGANO

301-5

RUMANA BONHUMORO

EN ELEKTITAJ RAKONTOJ

★

1932

Mendebla ĉe:
LEO MOREAU, RAAPOPSCHEWEG 55 - ARNHEM (Nederlando)

Tiun-ĉi libron eldonis
SIGISMUNDO PRAGANO
rezervante ĉiujn rajtojn.

ANTAŬ PAROLO

La sekvantaj rakontoj ne apartenas al tiuj „mondliteraturaj" verkaĵoj, en kiuj sufiĉas ŝanĝi la nomojn de la personoj kaj lokoj por forviŝi la lokan koloron kaj ricevi bildon neŭtralaspektan, ĝenerale homan, ĉie validan.

Ili, kontraŭe, havas evidentan lokan karakteron kaj prezentas, en siaj malmultaj paĝoj, kelkajn skizojn de homoj vivantaj aŭ vivintaj ie, sur iu preciza surfaco de la terglobo, en certaj cirkonstancoj kreitaj de la neniam egalrezulta kuniĝo de la historiaj momentoj.

Sed se ni ne volas fari el la Esperanta literaturo nur sporton por pruvi al la homaro la taŭgecon de nia lingvo ankaŭ sur la kampo beletristika, se ni opinias, ke la interkoniĝo de la popoloj estas la fundamento de iliaj reciprokaj amo kaj estimo kaj ni vere volas meti la mirlingvon de D-ro Zamenhof en la servon de la mondliteraturo, se ni volas disvastigi pere de ĝi la literaturajn trezorojn de forgesitaj popoloj, ni devas prezenti en niaj tradukaj klopodoj ĝuste la specifaĵojn de ĉiu popolo, ĝuste tion, kio iomagrade diferencigas nacion de nacio sen forviŝi per tio la stampon de la homeco ĉizita nedetrueble en ĉiun homan estaĵon.

Per tia interŝanĝado de literaturaj specimenoj ni povas esperi, ke la pensaroj de la popoloj interrilatiĝos kaj rezultigos pli da kompreno, pli da ŝato kaj malpli da suspekto kaj malamo.

*
* *

Tiu-ĉi paĝaro ne havas antologiajn pretendojn. La leganto entrovos nur kelkajn florojn el la abunde floranta ĝardeno de la rumana bonhumora literaturo.

Mi ne opinias necesa akcenti ke la renkontotaj tipoj estas tute izolaj kaj ne reprezentaj individuoj de iu speciala klaso aŭ popolrondo. La heroo de Visarion tute certe ne estas la tipo de la vigla kaj laborema rumana kamparano, same kiel ankaŭ oĉjo Johano Rado, laŭdire ekzistinta, ne volas esti vidigata kiel reprezentanto de la kamparana saĝeco. Kaj kiam temas pri Carageale*), la plej granda satiristo de ironia popolo, la rumanoj scias, ke la de li pentritaj situacioj estas fruktoj de lia nebremsebla fantazio kaj deziro sin vipe venĝi kontraŭ la aŭtoritato, kies potenculoj pli ol unu fojon kondutis nedankeme kontraŭ li.

Se la leganto ŝatos la popolajn tipojn aperontajn antaŭ li, tiam lia simpatio iros al la kvar kvinonoj de la kamparana rumana popolo. Tiam mi ne bedaŭros mian decidon prezenti al legantaro tutmonda ne psikologiajn kazojn ĝenerale kompreneblajn, sed iom da aromo de la sukoriĉaj kampoj, iom da simpla kaj sincera natureco.

Sed kiurajte mi retenas vian atenton sur tiuj-ĉi miaj linioj? Prefere legu la rakontojn mem kaj ĝuu ilin tutkore.

S. PRAGANO

Arnhem, en Decembro 1931

---

*) Rilate la elparolon de la nomoj bonvolu rigardi la noton de sur paĝo 63.

DU LOTBILETOJ

— Tio estas la plejo!... la plejo! ... krias sinjoro Lefter, viŝante sian ŝvitan frunton, dum sinjorin' Popesku, lia kunsortulino, serĉas senripoze ĉiuloke ... Ne estas kaj ne estas! ...

— Virino, ili devas esti en la domo ... Ja ne venis diablo por ilin forpreni! ...

Sed kion ili perdis? kion ili serĉas?

Ili serĉas du lotbiletojn per kiuj sinjoro Lefter Popesku gajnis.

Sed kiu ajn povus min demandi:

— Bone, se li perdis la biletojn, de kie scias sinjoro Lefter pri la gajno?

Estas afero simpla. La biletojn li aĉetis per mono pruntita; pruntita de sinjoro kapitano Pandele, ĉar multaj diris al li, kiam li konstante plendis ke li ne havas ŝancon en ludado, ke li provu ludi per mono pruntita ... kaj li konsentis, je honoro, antaŭ ates-

tontoj, doni el la gajno, se okazos, dek procentojn al la kapitano.

* *
*

Kiam li aĉetis la biletojn, sinjoro Lefter diris pesimiste:

— Ni vidu! mi kaj bonŝanco!

Sed sinjoro kapitano Pandele, pli optimista:

— Kiel vi povas koni mian ŝancon?

Kaj li igis sinjoron Lefter noti en lian libreton la numerojn de la biletoj.

Pasis longa tempo deposte. La lotumoj, tiomfoje prokrastitaj, okazis finfine, ambaŭ en la sama tago. Ĉe la unua (Loterio de la "Societo por la fondo de Rumana Universitato en Dobruĝo, en la urbo Konstanca*") la grandan premion de 50.000 leoj gajnis la numero 076.384; kaj ĉe la dua (Loterio de la "Asocio por la fondo kaj dotigo de Astronomia Observejo en Bukureŝto") la grandan premion de 50.000 leoj gajnis la numero 109.520.

Sinjoro Lefter, ĝis apenaŭ ĵuse, tute ne sciis, ke okazis hieraŭ ambaŭ lotumoj. Estis vespero; la homo sidis ĉe la tablo kun sia kunsortulino, en la vestiblo, parolante en trankvileco pri kiel kariĝas pli kaj pli la vivado, kiam li aŭdis fiakron haltantan ĉe la pordo, poste firmajn paŝojn en la korteto kaj poste iun frapantan tre rapideme al la ekstera vitropordo. Sinjoro

*) rumana haveno kaj banloko ĉe la Nigra Maro.

Lefter alsaltas por malfermi, konjektante enpense: Jen! denove nin venigas hodiaŭ vespere por eksterordinara servo la Rabiulo (la Rabiulo estas la ĉefo) por turmenti nin ĝis noktomezo kaj sin rekomendi poste al la ministro, ke li estas ekstra! — kaj sinjorin' Popesku rapidis en la ĉambron, ĉar ŝi estis en negliĝo. Sinjoro kapitano Pandele eniris kiel ventego kaj parolante ĉiam pli kaj pli laŭte, kvazaŭ sinjoro Lefter estus surda:

— Bone, kara, pro Dio! kial vi ne venis al la bierejo? Ĉu estas ebla tia indiferenteco? mi ja serĉas vin kiel frenezulo depost tiom da horoj!

— Nin retenis ĝis ĵuse la Rabiulo en la oficejo... Sed pro kio?

— Leftero!... ĉu vi nenion scias?

— Kion?

— Hieraŭ okazis niaj lotumoj!

— Nu?

— Ni gajnis!

— Ne diru!... Kiom?

— Ĉe ambaŭ ni gajnis la grandajn premiojn! la plej grandajn!

Kaj la kapitano metis sur la tablon la oficialajn listojn kaj apude sian notlibreton. Vere, la libreto diras ĝuste kiel en la listo: 076.384 *Universitato Konstanca*, 109.520 *Bukureŝto-Astronomio*.

* * *

La leganto komprenis nun kion serĉis depost tri tagoj fervorege la geedzoj Popesku.

Sinjoro Lefter sendis al la Rabiulo leteron, petante tutrespekte du-tri-tagan libertempon, tial, ke li tute ne sentas sin bone. Kaj eĉ tiel estas: li malsanas.

Post tiomtempa vana laboro, post kiam la tuta domo estis renversita dekfoje, jen tiel, jen alie, sinjoro Lefter falis sur kanapon, frakasita de laceco; li sentis, ke liaj artikoj detranĉiĝas, li sentis specon de malforteco ĉe la stomako, kvazaŭ akvaĵon; li duondormis kelkajn horojn kaj endormiĝis. La virino ankaŭ sidiĝis sur seĝon, ĉar ne plu povis elteni la piedoj kaj lumbo, kompreneble pro tiom da kurado kaj tiom da leviĝoj. Endormiĝis sinjoro Lefter eble depost proksimume kvaronhoro, kiam subite li rektiĝis, kun la vizaĝo lumigita de la radio de l' vero...

Mi scias kie ili estas! nun mi scias!...uf!... mi trovis ilin.

— Kie?

— En mia somera griza ĵaketo... kun ĝi mi estis en la bierejo, kiam mi aĉetis ilin. Mi bone memoras, mi metis ilin en la brustpoŝon, internen... Tie ili estas!... certe!... Alportu la ĵaketon!

Ju pli klare rememoradis sinjoro Lefter, des pli sinjorin' Popesku malkvietiĝis, ruĝiĝis, flaviĝis...

— Kiun ĵaketon? demandis ŝi konfuzita, kvazaŭ el alia mondo.

— La grizan.

— Leftero! diras la virino metante manon al sia maldekstra mamo, kvazaŭ ŝi estus sentinta teruran doloron.

— Kio?

— Mi...ĝin...fordonis.
— Kion vi fordonis?
— La ĵaketon.
— Kiun ĵaketon?
— La grizan!
— Al kiu?
— Ĉu vi ne diris, ke vi ne plu portos ĝin?
— Al kiu? al kiu vi ĝin fordonis, — malfeliĉulino?
— Al iu kalkoŝmiristino *).
— Por kio?
— Por teleroj.
— Kiam?
— Antaŭhieraŭ...
— Antaŭhieraŭ!... sen traserĉi ĝiajn poŝojn!
— Mi traserĉis, respondas la virino terurigita de sia kulpo; nenio enestis.
— Silentu! kriegas kruelege sinjoro Lefter... Por kiom da teleroj vi ĝin fordonis?
— Por dek... Mi sufiĉe marĉandis: ŝi ne volis doni plenan dekduon, respondas ŝi ne sciante plu kion ŝi diras.
— Kie estas la teleroj?... Mi volas vidi la telerojn! Alportu la telerojn! ordonas severege sinjoro Lefter.

Lia kunsortulino, ne plu dirante eĉ unu vorton, obeas; ŝi alportas kaj metas ilin antaŭ lin sur la tablon. Belaj teleroj! kun duobla bordero, unu malhelruĝa, larĝa, sur la rando, kaj alia rozkolora, mallarĝa, sur la bordo.

*) metio de mizeraj virinoj; ili blankigas la murojn per kalko malkaŭstika; kelkfoje ankaŭ negocas telerojn kontraŭ ĉiuspecaj ne plu uzataj malnovaĵoj: vestoj, ŝuoj ktp.

Sinjoro Lefter prenis unu kaj ĝin sonigas, - porcelano!

— Brave! bonan guston vi havas! li diras rikanante malicege.

Kaj pak! li ĵetas unu teren... splitoj! kaj poste, paf! alian same.

— Leftero!

— Tia mi estas, malavara, sinjorina moŝto! kiam mi havas emon, mi rompas; mi rompas, sinjorina moŝto, kiam mi havas emon, telerojn dekmilfrankajn! mi rompas, ĉu vi komprenas? mi rompas diable!

Kaj ree: pak! paf! ĝis la lasta, dum la sinjorina moŝto ekskuiĝas je ĉiu, kvazaŭ skurĝita per fajra vipo. Post kiam li ĉiujn finis, sinjoro Popesku elpoŝigas la viŝtukon, viŝas sian ŝvitan frunton kaj sidigas sin gravece sur seĝon; poste, kun la tono severa, sed kvieta, de la senkompata juĝisto parolanta al krimulo kiu staras antaŭ li:

— Al kiu kalkistino? Ĉu vi konas ŝin?

— Al Cika, tiu juna kaj bela, kiu venadis ofte al ni, respondas la kulpulino plorante, kun la animo rompita de malfrua pento.

— Ĉu vi scias, kie troviĝas tiu ŝmiristino?

— Ŝi diras, ke ŝi loĝas ĝuste en urbekstremaĵo, en la kvartalo de Teleruloj.

— Sufiĉe, malfeliĉulino!

Post unu horo, ĉirkaŭ vespero, fiakro pasas rapidkure tra la strato Emancipo el la Telerula Kvartalo; sur la gvidseĝo, apud la fiakristo, policano; funde sinjoro Lefter kaj sinjoro kapitano Pandele; kaj antaŭe, ankoraŭ unu policano kaj sinjoro komisaro de la respektiva policoficejo, Turtureanu, jam kuninteresita per kvin procentoj de la

gajno, — kompreneble nur se oni trovos la du biletojn. La komisaro scias kie loĝas la kalkoŝmiristino Cika.

La fiakro, pene pasinte tra koto, haltas finfine apud tera dometaĉo staranta solece sur vasta sendomejo. La komisaro enpostenigas la policanojn, kaŝante ilin malantaŭ la dometaĉo, laŭ la strategia regulo sanktigita por perfortado de kaŝejoj; li faras al ili la klasikan signon de Harpokrato, kaj poste iras sekvata de sinjoro kapitano kaj de sinjoro Popesku, por frapi al la pordo... Ĉifonvestita knabineto venas por malfermi. En la vestibleto lumigita de la flagro de kelkaj brulrestaĵoj el la fajrujo, ege odoras je viando kun prunoj; maljuna ciganino pretigas vespermanĝon. Ĉiuj tri vizitantoj reenpaŝas sur la sojlon metante manon al la nazo.

— Kie via patrino, he? demandas sinjoro komisaro.

— Ŝi devas baldaŭ veni, diras la infanino time rigardante la tri sinjorojn.

— Ekbruligu kandeleron kaj venu konduki nin en la ĉambron, por ŝin atendi.

La knabino staras nedecida.

— Venu! severkrias sinjoro Turtureanu ... kaj ĉiuj tri eniras, puŝante antaŭen la knabinon.

— Sed kio estas? demandas la maljunulino, leviĝante de ĉe la fajrujo, kie ŝi sidis kuntirite.

— Ni havas aferon kun via filino, kun Cika...

— Mankas io el iu domo... ŝi scias ja kio mankas, aldonas sinjoro Lefter.

— Ho ve! nobela moŝto, diras la maljunulino...

Ne havas Cika tiun kutimon! En ĉiuj nobelaj domoj oni konas ŝin... ĉe ĉiuj nobelaj moŝtinoj oni konas ŝin...

— Nu! ne plu parolaĉu, ordonas sinjoro kapitano Pandele, kaj ekbruligu! kiom longe vi volas lasi min stari?

— Jen mi bruligas ... Sed ne eble, Cika, nobela moŝto! Dio gardu! Mi, por Cika, povas meti mian manon en fajron, por Cika... Eble alia ŝmiristino.

Kaj dirante tion, la maljunulino ekbruligis seban kandelon kaj paŝis en la ĉambron sekvata de la nobelaj moŝtoj. La ĉambro havas du litojn, tablon, sidkeston, seĝon kaj fandferan forneton. Sur ambaŭ litoj kuŝas amasoj de vestoj, ŝuaĵoj, ĉapeloj, portaditaj ŝaloj; sub la litoj kaj sur la sidkesto diversegaj teleraĵoj kaj vitraĵoj...

Je l' ekvido de l' amasoj de malnovaĵoj, sinjoro Lefter ekmoviĝas, li alrapidas kaj komencas traserĉegi prenante kaj ekzamenante laŭvice pecon post peco, fadeneton post fadeneto. Kiom da rimarkoj ironiaj, frivolaj, sentimentalaj oni povus fari pri tia diverskoloreca amaso de malnovaĵoj, rilate la vanecon de la efemera mondo, tra kiu ankaŭ ili pasis dum momento novaj, nevelkintaj! Sed sinjoro Lefter ne havas tempon por filozofado ... Li serĉas... serĉas konstante... Fataleco! La griza ĵaketo ne troviĝas. Dum pensoj super pensoj bolas en lia kapo, jen Cika pene portanta sian korbon plenan de novaj malnovaĵoj, tre laca pro la dumtaga kurado kaj malsata: de malproksime ŝveliĝis ŝiaj nazotruoj responde al la malavara odoro de ĉe la fajrujo.

Tuj post ŝia eniro, ĉiuj tri gastoj ĉirkaŭas ŝin; sinjoro Lefter alkaptas ŝin de ĉe la brusto:

— Kie estas mia ĵaketo?

— Kiu ĵaketo?

— La griza ĵaketo.

— Kiu griza ĵaketo?

— La ĵaketo kun la biletoj.

— Kiuj „beletoj", nobela moŝto?

— Vi ŝajnigas nescion, vipuro!

— Dio min fulmotrafu! prenu min diablo! se...

— Prefere konfesu, diras sinjoro Turtureanu.

— Se vi diras, vi ricevos bonan mondonacon, aldonas sinjoro kapitano Pandele.

— Kion ŝi diru, nobela moŝto? diras la maljunulino incitita; kion ŝi diru, Disinjoro, se ŝi ne scias... jen aŭdu! kion ŝi diru?

— Vi silentu! kriegas sinjoro Turtureanu kaj jen li alpuŝegas la maljunulinon en la vestiblon.

La maljunulino krucosignas kaj la infanino tremas kiel vergeto, apud la fajrujo, kie la prunoj knaras forte en la kaserolo.

— Mi ne ĝuu... komencas ĵuri Cika.

— Ĉu vi ne estis, interrompas ŝin sinjoro Lefter, en la strato Pacienco, numero 13, ĉe sinjorin' Popesku, sinjorin' Lefter Popesku, sinjorino alta, maldika, bela, bruna, en la verda domo kun fenestrejo, kiu havas haran verukon super la maldekstra brovo kaj kutimas porti ruĝan harligon?

— Jes, mi estis.

— Do, kial vi mensogas?

— Ne, mi ne mensogas, nobela moŝto; mi estis. Nu?

— Ĉu ŝi ne donis al vi por dek teleroj, ĉar vi ne volis doni plenan dekduon, kun malhelruĝa bordero,

larĝa sur la rando kaj alia rozkolora, mallarĝa, sur la bordo, grizan ĵaketon?

— Jes, ŝi donis al mi.

— Do, kial vi mensogas?

— Ŝi ne mensogas, nobela moŝto! diras la maljunulino el la vestiblo.

— Vi silentu!... Kie estas la ĵaketo?

— Sur mi... mi portas ĝin sube.

— Por ke mi ne surprizu vin!

— Ne, la diablo prenu tiun, kiu ne portas ĝin pro malvarmo... Mi estas graveda, nobela moŝto... mi kuradas la tutan tagon tra neĝpluvo, — dank' al Dio, ĝi varmigas ĉe ventro kaj lumbo.

— Devestigu vin, ordonas sinjoro Lefter.

— Jen...

Kaj Cika komencas forĵeti de sur si la vestaĵojn. Ĝuste tute sube, sur la ĉemizo, vidiĝas la griza ĵaketo. Sinjoro Lefter rapide traserĉas ĝin en la brustopoŝo; la kalkistino grimacas, ĉar sentas tiklon ĉe la mamo. En la poŝo, nenio; sed funde estas dekudriĝaĵo... certe ili falis en la subŝtofan spacon. Cika demetas ĝin kaj ĝin donas al sinjoro Lefter, kiu malkudras ĝin per la poŝtranĉileto je ĉiuj steblokoj... En la subŝtofa spaco nenio, nenio, ree nenio.

— Kion vi faris kun miaj biletoj? blekegas terurece, kun la pugnoj streĉitaj, sinjoro Lefter, dum la aliaj du premas ŝin de proksime en angulon.

— Kiuj beletoj? hurlas ankaŭ la ŝmiristino frenezece kaj poste, ŝanĝante la tonon, ŝi forte krias al la maljunulino el la vestiblo, ciganlingve: „Alsaltu, ĉar

tute brulrostiĝas la prunoj!"

— Kion vi diris cigane? kriegas sinjoro Lefter.

— Ho ve! komencis lamenti la maljunulino kaj la knabino, kia malfeliĉo devis fali sur nin!

— Eligu miajn biletojn! dentgrincas sinjoro Lefter; eligu miajn biletojn, ŝtelistino! ĉar mi mortigos vin, ĉu vi komprenas? mi mortigos vin!

Kaj li donas al Cika vangofrapon konfuzigan. Tiam, ĉiuj tri inoj komencas blekadi, ke oni povis kredi, ke ekbrulis kaĝo kun panteroj. Sinjoro Turtureanu flankenpuŝas sinjoron Lefter kaj gravece:

— Lasu ŝin, mi petas... Lasu, ja diros iliaj moŝtoj ĉe la policejo.

Poste li eliras sur la sojlon, signalfajfas; la policanoj aperas kvazaŭ el la tero kaj forkondukas ilin antaŭmanĝe...

* *
*

La tuta arto de sinjoro Turtureanu restis senfrukta. La inoj nenion sciis pri la biletoj... Malgraŭ lia fervoro, li ne povis transpaŝi la limojn de l' prudento; tial li diris vespere en la bierejo al sinjoro Lefter kaj al la kapitano:

— Kun la maljunulino kaj la knabino, nu! ja eblas pli forte agi je ili; sed kun Cika ne tre eble, ĉar ŝi estas, pardonu, graveda; se okazus en la policejo aborto... Ĉu vi ne scias? Hodiaŭ oni ne plu povas fidi subulojn... ankaŭ ne superulojn! Oni aŭdas... La ga-

zetoj nur tion atendas por nin persekuti... Sed mi diras al vi, ke ne estas! La biletoj ne estis en la ĵaketo; mi povus veti je kio ajn vi deziras... Vi vidos kiam pasos iom via... kiel diri? via vantemo, tia estas ĉiu ajn komence, kiam venas al li surprizo pri tia gajno, vi vidos, — vi retrovos ilin hejme.

Sinjoro Lefter asertas, ke Cika ŝtelis al li la biletojn, la kalkoŝmiristinoj kaj la judoj ne estas stultaj: kiam ili aĉetas malnovajn vestojn, ili fundserĉas ĉiujn faldetojn.

— Nur donu ilin al mi, ĉu vi komprenas, je dispono, ke mi restu kun iliaj moŝtoj *tête à tête* en la policejo. Vi vidos kiel mi eligos la biletojn...

Kaj dirante tion li rigardas strabe, terurige kaj grincas per la dentoj.

Sinjoro Turtureanu respondas farante teoriojn pri krimenketado, bazite sur sia longtempa spertado en la servo de la publika sekureco. Tiel, ekzemple, la virinoj eltenas pli longe, ili estas pli obstinaj ol la viroj. Inter la viroj, la bulgaroj superas ĉiujn je eltenado; malplej multe eltenas la ciganoj, kaj la ciganinoj pli malmulte ol ĉiuj: tuj, kiam oni premas ilin iomete je korseto; „Haltu, mi diros, kara!"

Tial li malpliseveriĝis je la kalkistinoj, tamen lasante ilin ankoraŭ en la policejo, sen manĝo, por ke ili ankoraŭ pripensu, — eble!... sed li ne emas kredi.

Dum parolas sinjoro Turtureanu, sinjoro kapitano Pandele legas la vespergazeton kaj sinjoro Lefter aŭskultas enpensiĝinta. Subite, sinjoro Popesku paliĝas: sinjoro eniris la bierejon kaj pasas preter ilia tablo al

la fundo. Estas lia ĉefo el la ministrejo, tre malserena ulo kaj ege severa. Sinjoro Lefter leviĝas kaj salutas; la ĉefo apenaŭ kapklinas kaj sidiĝas ĉe tablo iom pli malproksime.

— Jen, diras sinjoro kapitano kaj montras ankaŭ al la aliaj la gazeton, en kiu staras:

„Kiel oni scias, la du grandaj lotumoj okazis ĉitiujn tagojn. La numeroj kiuj gajnis la grandajn premiojn po 50.000 leoj estas: ĉe Konstanca Universitato 076.384 — ĉe Bukureŝto-Astronomio 109.520.

„Tamen, stranga afero: ĝisnune la posedantoj de la du gajnintaj numeroj ne prezentis sin ankoraŭ por postuli siajn rajtojn. Por niaj multnombraj legantoj kaj niaj ĉarmaj legantinoj, en kies vicoj ni kore dezirus, ke troviĝu la gajnintoj, ni rememorigas, ke post ses monatoj de post la lotumo oni nenian gajnon plu povas postuli, sendepende de la motivo. La sumoj ne postulitaj ĝis la fatala templimo pasas aŭtomate al la fondoj de la koncernaj societoj".

Malgraŭ la respekto kiun inspiris al sinjoro Lefter lia ĉefo kiu okuladis lin subbrove de temp' al tempo kun rigardo admonplena, — t.e. „Vi trompaĉas nin; vi skribas ke vi malsanas, por foresti de la devo, kaj poste vi vizitadas bierejojn... Brave!" — malgraŭ tiu tre komprenebla respekto, sinjoro Popesku ne povis sin regi je la fina frazo el la gazetnoto, kaj ekis ridegon, bluan ridegon:

— Hahaha! vi sciu, oĉjo Turtureanu, ke ni trovos ilin la duan tagon post la templimo... Mi ja konas mian ŝancon!... Hahaha!

La rido kaj ĉi-tiuj vortoj igis sinjoron kapitanon Pandele eksalti de sur sia loko. Li, kiu ĝis tiam konservis kvietan sintenon, supera eĉ al kiu ajn laŭdo, devis finfine eksplodi.. Amaraj riproĉoj pro neglektemo, pro indiferento, pro senprudento! Kiam oni havas tiel valorajn paperojn, oni ne lasas ilin treniĝi tiamaniere de tie tien... Oni devus esti tro stulta! Tiaĵon oni devas travivi, se oni traktas aferojn centmilfrankajn kun stultulo! Kaj dirinte, sinjoro kapitano foriris ŝaŭmanta kaj blasfemante kiel malaltgradulo. Sinjoro Lefter kvazaŭ nenion aŭdis; li tamburas malrapidete per la fingroj sur la tabla marmoro.

Post kelkaj momentoj, sinjoro ĉefo, kiu estis paginta sian bierglason, leviĝas kaj pasante al la pordo preter la tablo, diras:

— Sinjoro Popesku, se vi ne volas plu veni al la ofico, tiam mi petas, sendu almenaŭ morgaŭ matene la ŝlosilon de via tirkesto, kie vi havas publikajn aktojn malfruantajn.

— Mi estis malsana, ĉefa moŝto.

— Neniaĵo!

— Honorvorte, ĉefa moŝto; morgaŭ mi venos nepre.

— Mi petas! diris mallongtone kaj premvoĉe la ĉefo kaj foriris sen saluti.

Sinjoro Turtureanu rigardis la horloĝon... Malfrue! Li devas iri al la noktdeĵoro: post unu horo pasos la inspektoro ĉe la policoficejo. Li foriras; sinjoro Lefter foriras post li. Li ĵetas sin en fiakron; sinjoro Lefter ĵetas sin post li:

— Mi ankaŭ iras al la policejo, oĉjo Turtureanu;

mi volas revidi la ŝtelistinon!

Sinjoro Turtureanu konsentas nur post kiam la amiko solene ĵuris honorvorte, ke li ne plu estos perforta, nenion plu faros al la arestitinoj. Survoje, sinjoro Popesku promesas al sia amiko altigi ties gajnoparton de kvin ĝis dek procentoj, se oni trovos la biletojn.

— Je miaj estonto kaj honoro! oĉjo Turtureanu!

Ili alvenis!... Malfeliĉo!... La inspektoro estis pasinta ĉe la policejo ĵuse; li esploris en la sekretejo, notis ion tre kolere en sian libreton kaj liberigis la tri inojn, konsolante ilin per mildaj vortoj.

— En grandan embarason mi kredas ke vi puŝis min, oĉjo Popesku, kun viaj imagaĵoj! diris sinjoro komisaro.

Sinjoro Lefter komencis vei:

— Do, sekve, se eĉ vi, la polico, ne protektas nin kontraŭ la banditoj, tiam, mi petas, kio restas? Mi komprenas, do, kiel staras la afero! Vi ne satiĝas eĉ per dek procentoj! Kiom vi volas, kiom vi deziras, sinjoro? sepdek? naŭdek? cent procentojn?

Kaj poste kaskado, ondego da insultoj al la adreso de la aŭtoritato kiu konsistas el ŝtelistoj, el tiranoj asociiĝintaj al rabistoj! ekzemple: sinjoro inspektoro, kiu interkonsentis kun la ciganinoj...

— Bele! belege! aldonas, post spirpaŭzo, sinjoro Popesku, kun tono de acida ironio.

Kaj poste, ŝanĝante la tonon, kun tondra voĉo:

— Honto por tiu-ĉi jarcentkomenco! trifoje honto!

La prudento kaj la amikeco igis sinjoron Turtureanu ne protokoli pri insulto al la funkcianta aŭtori-

tato, kaj tamen li eble estus tion farinta, se, je la lastaj vortoj, sinjoro Lefter ne estus elirinta kurege kiel frenezulo, kriante, ke li iras reklamacii ĉe la prokurorejo.

Jam videble matenkrepuskis, kiam sinjoro Lefter post tiom longa vagado tra kvartalaĉoj, alvenis fine en la sendomejon el la strato Emancipo, antaŭ la dometaĉo de kie ili perforte venigis la pasintan vesperon tiujn tri kalkoŝmiristinojn...

Eble...eble ke la petado povos venki tion, kion ne povis venki la perforto...kaj sinjoro Popesku frapas malkuraĝe al la pordo de la malriĉeca loĝejo...Nenia respondo...Li frapas ankoraŭfoje, same diskrete...La sama rezulto...Frapi pli kuraĝe!... Sed pli da kuraĝo li ne havas...Li alproksimiĝas galoŝpinte al la fenestreto kaj aŭskultas, kio povus okazi interne...En la silento de l' malseka kaj nebula mateno oni bone aŭdas ronkadon...La inoj, frakasitaj de la cirkonstancoj tra kiuj ili pasis, dormis profunde.

Sinjoro Lefter sidiĝis sur la lignan randon de la domantaŭajo kaj bruligis cigaredon...Li tiel sidis kelkan tempon, meditante pri parolado bone sentata por konvinki la kalkistinojn, ke laboremaj virinoj povas gajni havaĵon laŭ honesta maniero, ne ruinigante homon, en kies domo ili ĉiam gajnis panpecon... Estus domaĝe! kaj krome, li dissciigis: la biletoj estas nuligitaj; sed dek, dekkvin procentojn, jes! nekalkulebla havaĵo, kiu falas al ili elĉiele: riĉaj, sendependaj kaj...honestaj, k.s....

Subite oni aŭdas mallaŭtan bruon el la domo... Fine, ili vekiĝis. La gasto leviĝas, tusas kaj metas la manon sur la ĉapelbordon. Sammomente malfermiĝas la

pordo kaj sur la sojlo aperas la nekombita vizaĝo de l' knabino.

— Ho ve, panjo! alsaltu! ree venis tiu!

La virinoj rapide alsaltas:

— Ĉu vi ree venis, frenezulo?

— Ree vi venis por beletoj, ĉu? kriegas la maljunulino.

Kaj, antaŭ ol havis sinjoro Popesku almenaŭ tempon por saluti, li ricevas flaŝk! ĝuste en la okulojn, poton da kaĉigitaj prunoj.

— Jen beletoj!

— Igi nin mortigi, senkulpaj, en policejo, ĉu? fripono!

Kaj post kiam ili tiel blindigis lin, pluve: pugnofrapoj, vangofrapoj kaj poste ĉiu per kio povis tuj alkapti; la maljunulino per kaserolo, la knabino per balailo, kaj ruligis lin en koton.

— Jen beletoj!! jen beletoj!!!

Kiam bone laciĝis la kalkistinoj, foriris ankaŭ sinjoro Lefter sufiĉe laca, sed rapide, kaj nudkape, pro rapidemo, kaj la kalkistinoj post li:

— Hu! Hu! ĉu vi volas ankoraŭ beletojn? revenu por beletoj! hu! forrr!

Ĉirkaŭ la sepa kaj duono sinjoro Popesku estis hejme. Lia kunsortulino ne estis dorminta la tutan nokton pro zorgo. La sinjorino, vidante la staton de l' homo, ekploris ... Vespere estis veninta amiko de la ministrejo kaj estis lasinta leteron.

Li legas ĝin:

Kara Leftero,

„Hodiaŭ, kiam mi foriris de la oficejo, sinjoro Ĝeorĝesku, la ĉefo, diris al mi, ke mi sciigu vin, ke se vi morgaŭ ne venos al la oficejo, vi povas tute ne plu veni, ĉar li raportos por eksigo kaj igos rompi la seruron de via tirkesto, kie vi ŝlosis la aktaron de la afero Goldŝtajn. Venis hodiaŭ tri deputitoj kaj brue protestis, ke oni prokrastumas la aferojn. De morgaŭ ni komencas, dum la Parlamenta sezono, la oficon je la 8-a matene. Mi petas, viainterese, venu nepre, la ĉefo estas tre rabia.

Via fidela amiko,
Miĉjo.

Je la oka kaj kvin minutoj, sinjoro Lefter, lavita kaj freŝvestita, supreniras la ŝtuparon de la ministrejo. Li demandas la pedelon:

— Ĉu la ĉefo venis?

— Ĵuse, respondas la pedelo. Li ordonis, ke vi tuj iru al li.

Sinjoro Popesku rapidas kaj eniras tre humile. La ĉefo, kiu promenas tien-reen, kun la manoj en la poŝoj, tuj kiam ekvidas lin, haltas:

— Ĉu vi venis, sinjoro?

— Jes, sinjoro Ĝeorĝesku ...

— Ĉi tie mi ne estas sinjoro Ĝeorĝesku, sinjoro!

ĉi-tie mi estas „sinjoro ĉefo"... Vi alportu al mi tuj la aktujon de la afero Goldŝtajn ...

Kaj alifoje vi sciu ke mi forpelos vin. La ŝtato ne pagas la oficistojn por ke ili ebriadu dumnokte por poste malsani dumtage, — jen kiel malforteca vi aspektas! Anstataŭ veni al la devo... Ĉu vi aŭdas min? Alportu al mi la aktaron!

La oficisto eliras ŝancele. Li iras al sia skribotablo, malŝlosas la tirkeston kaj alkaptas nervece paperamason. Kiam li volas meti la amason sur la tablon, li senvole lasas fali teren, tra la fingroj, malgrandan falditan papereton. Li kliniĝas, — levas ĝin, — rigardas ĝin longe, ekkrias ...

— Ĉiuj dioj! ĉiuj mortis! ĉiuj mortas! nur la Ŝanco vivas kaj vivos apud la Tempo, senmorta kiel ĝi... Ili estas ĉi-tie!... ĉi-tie la biletoj!... jen estis la brilanta suno tiom longe serĉita blinde en mallumo!

Sinjoro Lefter estas trankvila, — tiu trankvilo de l' maro, kiu senmoviĝinta finfine, volas ripozi post la baraktado de terura uragano: ĝia vizaĝo estas serena, senfalda, dum en ĝia fundo kuŝas tiom da frakasitaĵoj de ŝipoj glutitaj por eterne, antaŭ ol ili povis atingi la bordon!

Li kaŝas en la sinon, inter la flanelo kaj la haŭto, en tola koverto, la du pecetojn da papero presita malhelruĝe, simile al la rando de la por eterne perditaj teleroj. Ridetante pro tiu vida rememoro, li butonumas la veŝton sen rapidemo, oportune sidiĝas en sian apogseĝon linoleuman kaj sternas per certeca mano sur folion de oficialformata papero la jenan komponaĵon, kiu sub ŝia lakona formo kaŝas tiom da ironio:

Sinjoro Ministro,

Mia tro delikata sanstato ne permesas al mi elteni plu la ĉiuspecajn malmildaĵojn de la oficado.

Mi do respekte petas vin, akcepti mian eksiĝon el la ofico kiun mi okupas ĉe tiu-ĉi honorinda Ministrejo.

Bonvolu akcepti, ktp.

Elefterio Popesku.

Poste li prenas la aktujon kaj la eksiĝpeton kaj eniras decide al la ĉefo, kiu laboras kun la nazo enpaperigita:

— Ĉefa moŝto, jen la aktaro Goldŝtajn.

— Bone, respondas la superulo sen levi la kapon. Lasu ĝin ĉi-tie.

— Kaj jen ankoraŭ, „sinjoro Ĝeorĝesku", mi tre petas, ankaŭ mian eksiĝpeton.

— Bone ... Lasu ĝin ĉi-tie.

— Mi salutas vin.

— Bone ... Iru!

Post dek minutoj, la homo forskuinta fine la jugon de la netolerebla sklaveco eniras ĉe la bankiston, kie estis deponitaj la biletoj *en gros*.

— Mi petas, kie oni enkasigas la gajnojn de la lotumoj kiuj okazis antaŭhieraŭ?

— La sumo estas deponita ĉe la Ŝparkaso, sed oni povas enkasigi ankaŭ pere de ni. Ĉu vi havas gajnintan bileton?

— Mi havas du gajnintajn, respondis senafekte sinjoro Popesku kaj montris de malproksime la biletojn, tenante ilin gracie inter du fingroj.

— Ĉu estas grandaj gajnoj?

— Grandetaj... Mi havas ambaŭ grandajn premiojn!

La bankisto malfermas admirplenajn okulojn kaj diras, provante preni la biletojn:

— Permesu, mi petas.

Sed sinjoro Lefter retiras malrapide la manon, disfaldas la biletojn kaj demandas:

— Ĉu vi ne havas la oficialajn listojn?

— Jes, jen.

— Pardonu, diras sinjoro Lefter kun dissilabigitaj vortoj, ni havas unue: nulo-sep-dek-kaj-ses-mil-tri-cent-ok-dek-kvar,—Universitato-Konstanca.

— Ne, respondas la bankisto: unu-cent-kaj-naŭ-mil-kvin-cent-du-dek.

— Permesu, ne konfuzu min: unu-cent-kaj-naŭ-mil-kvin-cent-du-dek,—Bukureŝto-Astronomio.

— Ne, pardonu, diras la bankisto. Bukureŝto-Astronomio nulo-sep-dek-kaj-ses-mil-tri-cent-ok-dek-kvar.

Sinjoro Lefter ne konscias bone kial, sed li sentas svenon kaj falas, porcelanblanka, sur seĝon apud la kontoro, etendante aŭtomate la manon kun la biletoj. La bankisto prenas ilin, rigardas bone al la listoj, al la biletoj, al ilia posedanto, kaj ridetante, ankaŭ senafekte, diras al sinjoro Lefter, kiu aŭskultas stultece:

— Jen kio estas, estiminda sinjoro: vi trompiĝis kaj jen de kie devenas... Vi havas... Stranga afero,

estas vere...kiel okazis!...Je diablo!... Vi havas ĉe unu ĝuste la numeron kiu gajnis ĉe la alia kaj...

— Kaj...kio?

— ... kaj reciproke.

Kiam li aŭdis la vorton „reciproke", sinjoro Lefter fariĝis hepate blua kaj leviĝis eksplodante kun superega parolrapidego:

— Reciproke! Ne eble, sinjoro! maleblege! Reciproke! Tio estas ĉarlataneco, ĉu vi komprenas!? Mi lecionos al vi fari plue abomenindaĵojn kaj primoki homojn, ĉar estas ekspluatado kaj vi ne plu satiĝas, kiel la vampiroj, perdante la tutan fruntŝviton ĉiu honesta homo, ĉar li fidas blinde je viaj neniaĵoj kaj kun judecaj friponaĵoj borsaj, ĉar ni estas stultaj kaj ne instruiĝas finfine por veni, ĉu vi komprenas, kaj ribeli... jes! ribeli! Tiel, vi sciu: stultaj! stultaj! stultaj!

Kaj li komencis veadi, frapi per la manplatoj sur la okulojn kaj per la pugnoj sur la kapon kaj trotadi, per la piedoj, farante tian bruaĉon, ke devis la bankisto peti la helpon de la publika forto por povi seniĝi de sinjoro Lefter ...

* *
*

Se mi estus unu el tiuj aŭtoroj kiuj respektas sin kaj estas tre respektataj, mi finus mian rakonton tiel:

... Multaj jaroj pasis de tiam.

Pli poste, kiu vizitis la monaĥinejon Ciganeŝti, povis vidi tie monaĥinon maljunan, brunan, altan kaj

maldikan, kiel sanktulino, kun granda hara veruko super la maldekstra brovo kaj kun ekstaza rigardo. Ŝi diradis nenian vorton, volis respondi al neniu demando, nenian malbonon ŝi faradis; ŝi estis, male, tre milda. Nur unu kutimo denuncis iel ke, sub ŝia serena frunto briletis menso kun elradikiĝinta apogpunkto: la tutan tagon, la monaĥino Elefteria kolektadis, mirige kie ŝi nur trovadis ilin, potsplitojn, kiujn ŝi kaŝadis pie en sia malalta ĉeleto.

Same, iam, tie malproksime, en la bruanta ĥaoso de Bukureŝto, la pasantoj povis vidi malaltan maljunuleton, kadukan kaj kuntiriĝintan, promenantan trankvile, kun tiu trankvilo de l' maro, kiu, kvietiĝinte finfine, volas ripozi post la barakto de terura uragano. La maljunuleto promenadis regule, — matene, tien-reen antaŭ la Universitato, — vespere, tuj post la apero de l' steloj, ĉirkaŭ la Fajrobrigada Observejo ĉe la vojdisiĝo de la bulvardo Pake, — flustrante konstante, per milda voĉo, la saman vorton: „Reciproke!..." — vorto malpreciza kiel la malprecizo de la vasta maro, kiu sub sia senfalda vizaĝo kaŝas en siaj sekretaj rokaj profundoj Dio scias kiom da ŝipoj frakasitaj antaŭ ol ili atingis la bordon, poreterne perditaj!

Sed ... ĉar mi ne estas tia aŭtoro, mi preferas konfesi sincere: post la brua interdisputo ĉe la bankisto, mi ne scias kio okazis plu al mia heroo kaj al sinjorin' Popesku.

OĈJO JOHANO RADO

En 1857, dum oni preparadis la Unuiĝon en Jaŝo, la moldaviaj nobeloj, kiel Kostake Hurmuzaki, M. Kogalniĉanu kaj aliaj, trovis oportune venigi al la Kunveno ankaŭ kelkajn fruntajn kamparanojn, po unu el ĉiu distrikto, por ke ili ankaŭ partoprenu je la efektivigo de tiu grandioza kaj nobla naciaĵo. Tuj post la alveno de la kamparanoj en Jaŝo, la nobeloj, kunaginte, bele koketigis ilin kaj vestis ilin uniforme: blankaj pantalonoj kaj novaj peltĉapoj, ke miris la kamparanoj pri la sanĉo, kiu ilin trafis. Poste, oni diras ke ili estis transdonitaj al unu el la nobeloj, ke tiu paroladu al ili, por komprenigi la celon de ilia venigo Jaŝon.

— Vi, bonuloj, ĉu vi scias por kio vi estas venigitaj tien-ĉi inter nin? diris la nobelo mildece.

— Ni scios, via moŝto, se vi diros al ni, respondis timeme maljuneta kamparano, gratante sian kapon.

— Nu, jen kio, bonuloj: depost centoj da jaroj du frataj landoj, kristanaj kaj najbaraj, nia Moldavio kaj la Valaĥio aŭ la Montara Lando, pri kiu vi eble aŭdis paroli, ŝiras kaj mordas unu la alian, je la terura turmento de la rumana nacio. Landoj frataj kaj kristanaj mi diris, bonuloj; ĉar kiel preĝas ni, la Moldavianoj, tiel preĝas ankaŭ niaj fratoj el Valaĥio. La staturo, parolo, manĝo, vestoj kaj ĉiuj kutimoj kiujn havas ni, havas tute same ankaŭ niaj montarlandaj fratoj. Landoj najbaraj mi diris, bonuloj; ĉar nur la rivereto Milkovo fluanta tra Fokŝani, disigas ilin. „Ni sekigu ĝin per unu sorbo!" kaj ni faru la sanktan Unuiĝon, t.e. la interfratigon deziratan de niaj popoloj, kiun ili ne povis fari pro la iamaj malfacilaj cirkonstancoj. Jen, bonuloj, kian kristanecan kaj belan aferon ni devas fari. Nur helpu nin Dio! Ĉu vi komprenis, mi petas, bonuloj, pro kio ni venigis vin? Kaj se vi volas ion diri, ne malkuraĝu; diru verde moldavie, kiel al fratoj kiaj ni efektive estas al vi. Ĉar tial ni kunvenis tie-ĉi, por klerigi nin, unu la alian, kaj por ke Dio klerigu nin ĉiujn, kiel Li bonvolos.

— Ni komprenas, via moŝto, tiel devas esti, respondis kelkaj pli hontemaj kamparanoj; ĉar nu, se ne scios vi kio okazas en la mondo, ĉu ni la kamparanaro de ĉe la plugilo, povus scii kio estas bona, kio malbona?...

— Ja mi, sincere dirante, via moŝto, ne komprenis — respondis laŭ onidiro kuraĝe unu el la kamparanoj, nome Johano Rado. Kaj eĉ se lertus ankaŭ ni pri io, kiu atentus pri nia buŝo? Laŭ diraĵo, via moŝto:

"La kamparano, kiam iras, trotas, kaj kiam parolas, bruas" — pardonu respektata via persono. Mi juĝas, ke tiun aferon oni estus povinta fari ankaŭ sen ni; ĉar nu: ni scias manovri fosilon kaj falĉilon, sed vi manovras skribilon, kaj se vi volas, vi scias fari el blanko nigron kaj el nigro blankon... Dio donacis al vi inteligenton, por konsiladi ankaŭ nin, la plebon.

— Tute ne, bonuloj, jam pasis tiu tempo, kiam nur la nobeloj faris ĉion en tiu-ĉi lando kaj eltordis ĝin laŭplaĉe. Hodiaŭ ĉiuj, de la Moŝto ĝis la boto, devas partopreni la embarasojn kaj felicon de la lando. Laboro kaj gajno, devoj kaj rajtoj por ĉiuj egale.

Diris poste al ili la nobelo pri la deveno de la Rumanoj, kiel kaj de kiu ili estis portitaj en tiujn ĉi lokojn; pri la vergetfasko, pri la malamikaj bovoviroj kaj fine klopodegas la kristano el ĉiuj fortoj komprenigi ilin kiuj estas la bonfaraj fruktoj de l' Unuiĝo rememorigante al ili, ke ankaŭ "por la unuiĝo de ĉiuj" oni preĝas en la sankta preĝejo ĉiutage, jam depost pli ol 1850 jaroj. — Nu, bonuloj, nun mi kredas, ke vi komprenis.

— Komprenis, moŝto, kiel eble plej bone, respondis preskaŭ ĉiuj. Dio vin helpu al bono!

— Nur mi ankoraŭ ne, via moŝto, respondis oĉjo Johano Rado.

— Pardonu min Dio, oĉjo Johano, sed vi, kiel mi vidas, estas iom pezkapa; nu, venu en la ĝardenon, ke mi faru vin ankoraŭ pli bone kompreni. Oĉjo Johano, ĉu vi vidas tie en mia korto tiun ŝtonegon?

— Mi vidas ĝin, via moŝto.

— Nu, bonvolu, alportu ĝin tien-ĉi, apud min,

diris la nobelo, kiu nun sidis en apogseĝo inter la kamparanoj.

— Estu pardonate, via moŝto, mi ne povos, ĉar tie estas pezo, ne ŝerco.

— Nu, iru ankaŭ vi, oĉjo Vasile; ankaŭ vi, oĉjo Ilie; ankaŭ vi, oĉjo Pandelaki.

Finfine iras 3-4 kamparanoj, ekmovas la ŝtonegon, levas ĝin surŝultren kaj alportas ĝin apud la nobelon.

— Nu, bonuloj, ĉu vi vidas?... Iris oĉjo Johano kaj ne povis fari la laboron sola; sed kiam iris kelkaj el vi helpe, oni facilege faris la laboron; la malfacilo ne plu estis sama. Laŭ diro de l' kanto:

Kie unu, mankas forto
Dum dolor', malbona sorto.
Kie du, la fort' pliiĝas,
Malamikoj ne multiĝas.

Tiel ankaŭ pri la Unuiĝo, bonuloj; ĉu vi opinias, ke se helpos Dio ke unuiĝu Moldavio kun Valaĥio ni estos nur tiom? Niaj fratoj el Transilvanio, Bukovino, Basarabio kaj tiuj transdanubaj, el Macedonio kaj el aliaj mondpartoj, ili nur vidu nin, ke ni bone vivas, ili ankaŭ ĝojos kaj nin amos, ke neniam kuraĝos la malamikoj ataki nin. Kaj ankaŭ niaj sangfratoj: la Francoj, Italoj, Hispanoj kaj Portugaloj kion atendas? Je ĉiu okazo, Dio nin gardu, ili estas pretaj verŝi sian sangon por ni...

La Unuiĝo faras la forton, bonuloj. Nu, mi kredas, ke nun vi komprenis kaj komprenegis.

— Nur mi unu, pardonu via moŝto, ankoraŭ ne

komprenis, respondis oĉjo Johano Rado.

— Kiel do eble, oĉjo Johano? Pli bone klarigi,... eĉ infano estus povinta kompreni.

— Jen tiel, via moŝto, respondis la aliaj.

— Oĉjo Johano, diris nun la nobelo iom konfuzita pro laco; nu, diru vi, viascie, kion vi komprenis, kion vi ne komprenis, de kiam oni tiom parolas ĉi-tie; ke ni ankaŭ aŭdu.

— Nu, via moŝto, ne estu kolera; sed de parolo ĝis ago estas granda distanco... Via moŝto, *kiel ĉiu nobelo*, nur ordonis al ni, ke ni alportu la ŝtonegon, sed ne almetis la ŝultron kune kun ni ĉe la portado, kiel vi antaŭe diris, ke de nun ĉiuj partoprenos la ŝarĝojn, de la Moŝto ĝis la boto. Bone estus, se tiel estus, via moŝto; ĉar ĉemilite reirite kaj ĉedonace sinpuŝemo, ne tre estas konveno.

Kaj de via ŝtonego mi komprenis jene: ke ĝis nun ni kamparanoj portis ĉiu po unu ŝtono, pli granda aŭ pli malgranda, sur la ŝultroj, sed nun ni estas vokitaj porti kune, same ni, *la boto*, rokon sur niaj ŝultroj... Faru Dio, via moŝto, ke estu alie, ĉar mi unu ne bedaŭros...

Je tiuj vortoj la kamparanoj komencis ŝultrosvingi, rigardi longe unu la alian kaj diri:

— Nu, eble ke nia Rado ankaŭ pravas.

Kaj la nobelo, interrompante lin per ŝercoj, englutis la pilolon kaj eksilentis tute.

LA STACIESTRO

La vagonaro malvigle iradis, trapasante la kampojn rostiĝantajn en la bakforno de la julia suno. Ĝi klopodis, spiregis kiel dikulo kuranta post tramveturilo por ĝin eniri, kiam la tramoj estas plenaj kaj la varmo grandega.

Malgranda difekto de la vapor-pumpilo devigis la mekanikiston iri per malpli granda rapideco.

Sed la vojaĝantoj estis duonmortaj. Multaj homoj veturis al Konstanca, la vagonfakoj estis plenaj kaj ankaŭ la koridoroj tiel plenaj, ke la cirkulado estis neebla.

Mallongan tempon la vagonaro iris per la kutima rapideco, freŝiga blovo eniris tra la malfermitaj fenestroj, sed nun pro tiu „difekto" la varmo de sur la kampo eniris en fajraj ondoj tra ĉiu fendo de la vagono. Estis tute neeble fari iom da trablovo. Maljuna virino protestis, kiam oni volis ŝanĝi la aeron de la kupeo, ĝis kiam fine ŝi ĉesis diskuti kaj kontentiĝis per la levo de la fenestro, kiam oni malfermis la pordon, aŭ per la fermo de la pordo, kiam oni malfermis la fenestron.

En la koridoro sinjoro ventumis sin per pajla ĉapelo. Kelkaj impertinentaj infanoj, malpuraj de ĉokolado, iradis tra la amaso por paŝi de unu kupeo al alia, malpurigante la fremdajn vestojn per ĉokolado. Tedite, oficiro kriegis al ili: „Trankviliĝu, aŭ mi eljetos vin el la vagonaro!"- La minaco efikis por kvaronhoro, poste unu el ili, volante tamen trairi, ion flustris en la patrinan orelon kaj la patrino, prenante lian manon, ŝovis lin tra la amaso kaj petis pardonon, ke la knabo bezonas ien iri.

Ĉe la fenestro, Vasile Bukŝan babiladis kun la kuracisto de banloko Tekirghiol. Dika, ruĝvizaĝa, kun la poŝtuko ligita sur la kolo, Bukŝan ŝajnis bonhumora homo post manĝo, kie oni multe trinkis. Ili babiladis pri la banloko, pri la kareco de la hoteloj, kiam jen eniras la konduktoro por peti la biletojn por la venonta stacio.

La konduktoro ŝajnis tre honesta homo, serĉanta iun, kun kiu li povus babili.

— Kie ni alvenas, amiko? — demandis Bukŝan.

— En Feteŝti. La biletojn por Feteŝti! Kiu eliros?

— Jen Feteŝti! Brave! Ni ja bone iradas! — Kaj Bukŝan komencas ridi.

— Bone, malbone, kion fari? Ni malfruiĝis du horojn, tiu maŝinaĉo estas kulpa.

— Kial oni ne ŝanĝas ĝin, amiko? — enmiksiĝis la doktoro.

— Oni parolas pri ŝanĝo en Feteŝti. Oni jam telefonis.

— Do bone, ke oni ĝin ŝanĝos, — diris Bukŝan.

— Bona homo estas tiu Angelesku. Ĉu li estas ankoraŭ staciestro en Feteŝti?

La konduktoro malfermegis la okulojn:

— Angelesku? Neniam ia Angelesku estis staciestro en Feteŝti!

— Ne diru, mi ja estas bona amiko kun Angelesku el Feteŝti.—Kaj li klarigis ion per okulfermo al la doktoro, kiu ne komprenis la sencon de la interparolo.

— Ne estas, sinjoro, se mi diras. Ĉu mi ne pasas tie trifoje ĉiusemajne? Tie sinjoro Jonesku estas staciestro, Andreo Jonesku.

— Vi pravas, tiel estas! Mi konfuzis lin kun alia. — Andreo Jonesku, homo alta, bruneta.

— Sinjoro Jonesku estas mallonga, dika.

— Mi konas lin, mi konas lin! Tiel li aspektas! Mi rememoras Andreon Jonesku.

Kaj signinte al la doktoro, ke li tute ne konas Andreon Jonesku. li daŭrigis la esploradon.

— Kiel li fartas? Ĉu li edziĝis? Mi konas lin kiel vivkapablan junulon.

— Oho, li edziĝis antaŭ 20 jaroj! Li havas infanojn, knabon kaj knabinon. Fraŭlinon Margareton li edzinigas kun leŭtenanto el Ĉernavoda. Kaj lia knabo ĵus finis la liceon.

— Ĉu vere? Li edzinigas Margareton? Li devas esti tre kontenta!

— Certe! Alvenis ankaŭ lia bopatrino. Malfeliĉa virino, nun, dum la maljuneco okazis al ŝi malfeliĉo! Ŝia piedo rompiĝis kaj ŝi iradas kun bastono, ĉar ŝi lamas. Kion fari? Verŝajne dum la maljuneco la osto

putriĝas kaj ne plu saniĝas, sed malgraŭ sia stato, dum la tuta tago ŝi ordigas en la ĉambro kaj en la korto ĉion.

Ĉar la bopatrino ne plu interesis lin, li ŝanĝis la temon de l' diskuto.

— Sed kiel nomiĝas la knabo?

— Joĉjo! Li malsanis: havante skarlatinon; li saviĝis. Li ankoraŭ estas malgrasa, oni lin sendis Konstanca-n. Li volas fariĝi inĝeniero. Li ŝatas la kalkulojn.

— La biletojn, sinjoroj, kiu eliros en Feteŝti? — La konduktoro lerte glitas tra la vojaĝantaro, kaj malproksimiĝas. Dume la doktoro demandas Bukŝanon:

— Diru al mi, ĉu vi konas aŭ ne la staciestron el Feteŝti?

— En mia vivo mi neniam vidis lin.

— Do tiam?

— Mi babiladis por ne enui tie-ĉi. Ĉu vi ne rimarkis lian babilemon? — Li ne finis la parolon, kiam la konduktoro revenis, kvazaŭ li estus forgesinta ion.

— Mi forgesis diri: amaso nun estas ĉe la sinjoro staciestro. Alvenis liaj kuzinoj por helpi ĉe la kudrado, kaj ankaŭ la fianĉo, kiu havas libertempon...

Li ne povis finparoli, ĉar longa fajfo anoncis la eniron en la stacion. La vagonaro rapide iras, ĝi haltas sur la unua relparo, antaŭ la perono.

Sciante, ke pro la maŝinŝanĝo okazos malfruiĝo, la vojaĝantoj eliris por aĉeti ian manĝaĵon.

Tra la amaso, la staciestro, Andreo Jonesku, kuradis por ŝanĝigi la maŝinon. Post trikvaronhora haltado, dum kiu tempo Bukŝan kaj la doktoro intere-

siĝeme sekvis lin, la staciestro ordonis la preparojn por la ekiro. Estis ankoraŭ kelkaj minutoj antaŭ la ekiro kaj Andreo Jonesku rigardis la vagonaron ekirontan, kiel amoplena patro la forirontan infanon. — Subite Bukŝan klinas sin eksteren kaj ekkrias:

— Andreo!

— Jes!

Kaj la staciestro levis la okulojn, ravite, ke li trovas konaton.

— Andreo! Kiel vi fartas, Andreo?

— Bone! Kie vi estas? Kiu min vokas?

Li bone vidis, ke Bukŝan vokis lin, sed ne konante lin, li opiniis, ke estis nur ŝajno.

— Tie-ĉi! Ĉe la fenestro! Do kiel vi fartas?

— Bone, sinjoro, sed kiu estas vi?

— Ĉu vi ne plu konas min? Ho ve! Tian staton vi atingis?!

Andreo Jonesku malfermegis la okulojn por rekoni lin, sed vane. Tiam li pensis, ke la sinjoro ĉe la fenestro eble konfuzis lin kun alia kaj ĝentile ridetante li turnas sin al li:

— Sinjoro, vi eraras. Eble alia Andreo estas, kiun vi konas. Mi tute ne konas vin!

— Ho ve, Andreo, junulo! Ĉu vi ne rekonas min? — Kaj rememorante ĉion, kion la konduktoro diris al li, li komencas rakonti:

— Do mi gratulas. Vi edzinigos Margareton. Bona knabo prenos ŝin. Mi aŭdis, ke li fariĝos kapitano!

La staciestro paliĝis. Tiuj-ĉi vortoj falis sur lian kapon kiel piŝto-puŝo. Do ili konas unu la alian. Ne

okazis eraro. Kaj tamen li ne sukcesas rememori pri la homo parolanta ĉe la fenestro.

— Kiu vi estas, sinjoro?

— Nur tio mankas! Kiu mi estas? Nun, divenu!

La doktoro preskaŭ mortis pro rido malantaŭ Bukŝan, kiu daŭrigis:

— Saluton al via bopatrino! Mi aŭdis, ke ŝi estas tie-ĉi por la edziĝfesto. Mi kompatas ŝin, pro la piedmalsano. Do kion fari, je ŝia aĝo ŝi povas iri kun bastono. Sed diru, ke ŝi lasu la ordigon en la ĉambro! Nun estas la vico de Margareto.

— Kiu vi estas sinj... volis ankoraŭ diri Andreo Jonesku, sed estis maleble, Bukŝan daŭrigis kiel malnova konato, kiu ĉion scias. Tiuj detaloj frenezigis Andreon.

Mi iras Konstanca-n. Mi vidos Joĉjon. La malfeliĉulo, — bone, ke li saviĝis. Tiuj skarlatinoj estas tre danĝeraj.

— Kiu vi estas, sinjoro? — malespere demandis la staciestro penante rememori pri la interkonatiĝo. Bonvolu diri, kiu vi estas kaj kie ni interkoniĝis?

— Verŝajne li bedaŭras, ke li ne ankaŭ ĉeestas kun la kuzinoj kaj kun la bofilo ricevinta libertempon.

Mallonga fajfo, trumpeta sono kaj longa, elnaza: „Preta" ekirigis la vagonaron. Unu momenton la staciestro pensis pri la haltigo de la vagonaro, sed la penso pri la respondeco ne lasis lin.

— Kiu vi estas, sinjoro, de kie vi konas min tiel bone?

— Dio helpu vin! Andreo, junulo, ĉu vi tiom stultiĝis? — kaj la vagonaro ekmoviĝis!

— Sinjoro!...

— Ĉu vi stultiĝis? Tiom stultiĝis? — kriis Bukŝan el la fenestro.

Andreo Jonesku, kun la ruĝa ĉapo en unu mano, kaj per la alia viŝante la ŝviton de sur la vizaĝo pli ruĝa ol la ĉapo, komencis kuregi post la vagonaro, petegante Bukŝanon, ke li diru sian nomon. Tamen ĉio estis vana. Je la plezuro de la vojaĝantoj kaj de la doktoro, la vagonaro ekrapidis. Andreo restis malantaŭe, kvazaŭ fulmtrafita, rigardante la malproksimiĝantan poŝtukon, similan al papilio.

La stacidomo restis malgaja, dezerta. Servisto balais la peronon. Monotone frapetis la telegrafilo. De tempo al tempo sonis la nigra sonorilo apud la horloĝo por sciigi preterpason de vagonaro, kaj ĉiufoje ŝajnis al Andreo, ke iu trapikas najlon tra lia koro. La vagonaro ĝi estis, kun la nekonato kiu tiel bone konis lin kaj pri kiu li ne povas rememori.

Nervoze li iradis, penante rememori ĉiujn lokojn, kiujn li vizitis, ĉiujn homojn, kiujn li konis, laŭvice li pensis pri oficejoj, vendejoj, kie li ion aĉetis, sed vane. Li ne povis trovi la vizaĝon de tiu nekonato.

Post kelkaj tagoj, tagoj de suferado kaj ekscitiĝo, li forgesis la vizaĝon de la nekonata homo el la vagonaro. Dika nebulo lokiĝis sur ties vizaĝon kaj ĝi malaperis ĉiuminute; por refreŝigi la memoron, li iris tien, kie okazis la okazintaĵo kaj levante la okulojn supren, li kredis, ke ili ankoraŭ interparolas.

Iom post iom la figuro de Bukŝan tute viŝiĝis el la suferanta menso de la staciestro kaj ĝi malaperis,

kiel malaperis la vagonaro ĉe la vala kurbiĝo, irante al la Danubo.

Ĉiutage li atendas la vagonarojn venantajn de malsupre, eble li retrovos lin, kaj li ĵuras, ke tiun fojon li ne ekirigos la vagonaron antaŭ ol li eksciis, kiu li estas.

Nokte li terure turmentiĝas por rememori la figuron de tiu, kiu tiel bone lin konas. Multfoje, sonĝante, uragane li ĵetas sin en la estintecon, li ekprenas iun, alportas lin al klara lumo, rigardas lin, sed apenaŭ rekonante lin, li vekiĝas kaj en la matena lumo, kiu disigas lian lastan esperon, li aŭdas voĉon, kiu mallaŭte flustradas de malproksime:

— Andreo, junulo, vi stultiĝis, vi stultiĝis!...

D. D. PATRASCANU

La venkinto de Napoleono

En tiu somero la profesoro Karanfilo iris pasigi la libertempon ĉe la Njamca Monaĥejo, kaj en la tago en kiu okazis al li tio, kion li rakontis al mi, li estis farinta ekskurson kun pluraj amikoj kaj konatuloj en la ĉirkaŭaĵojn de la monaĥejo ĝis trans la kapelon de Prokovo. Kiam li alvenis hejme, ĉe la pastro Kipriano, kie li loĝis, jam tute krepuskis, kaj Karanfilo pensis kun plezuro pri la mola litaĵaro, en kiu li estis ripozonta post la tagaj laciĝoj. Enirinte, li ĵetis, kiel kutime, la rigardon al la malnovaj gravuraĵoj en la ĉambro. Sur unu el la muroj, la portretoj de Aleksandro II-a kaj de la imperiestrino Maria Feodorovna, sur kiuj la tempo lasis ĉiuspecajn postsignojn, pendis apud la „Pafmortigo de Maksimiliano", kaj sur la antaŭa muro estis la sankta Athos kaj apude la portreto de Napoleono, farita laŭ tiutempa ilustraĵo.

Karanfilo pretigis sin por enlitiĝo, pensante pri

ĉiuspecaj aferoj. Li bone amuziĝis tiun tagon, en gaja kaj agrabla akompano... Tie ĉi, Karanfilo ridetis: Post kelkaj tagoj li faros novan ekskurson, al la Njamca Fortikaĵo, kie li neniam estis. „Kompatinda Stefano la Granda", li pensis, „granda homo!" Kaj Karanfilo, en patriotisma subitaĵo, depreninte la surtuton, faris du paŝojn en la ĉambro, kaj haltis antaŭ Napoleono.

„Terura figuro," daŭrigis la profesoro fikse rigardante la vizaĝon de l' imperiestro... „Sed li ankaŭ vidis la diablon ĉe Waterloo kaj la duko de..."

Tie ĉi Karanfilo haltis, ĉar ne revenis rapide en lian memoron la nomo de la vaterloa heroo...

„Mi enlitigu min," li pensis, „ĉar mi devas vekiĝi tre frue... Morgaŭ mi restos hejme... mi finos Tolstojon... kaj postmorgaŭ... Kiel li nomiĝas?... la duko de... Nu, prenu lin la diablo...", li finis kaj enigis sin sub la litkovrilon...

Karanfilo metis la manojn sub la kapon kaj fermis la okulojn, decidiĝinte dormi, sed io malhelpis lin. „Ne, kara, ja ne eblas..." kaj li strečis sian tutan atenton por elpreni el la amaso da konoj kaj propraj nomoj, registritaj en lia kapo, la nomon de la angla heroo.

„Finfine, kial li interesas min?" pensis Karanfilo, kiam li vidis ke la duko rifuzas eniri en la lumon... „Prefere mi ripozu..." — kaj li faris tre decidan movon kiu montris, ke li volas nepre dormi.

„Tamen, mi devas rememori...", diris iom poste Karanfilo, „la duko de... kiel li nomiĝas... la duko de..." Sed la duko de... obstine rifuzis montriĝi.

„Nu, de nun sufiĉe..." malmilde ordonis al si la

profesoro kaj turniĝis kun la vizaĝo al la muro. Li iom restis tiel, poste li malfermis la okulojn kaj diris: „Ĉiukaze estas frue. La duko de... Bal... ne... la duko de Kal... ne... la duko de Ak..., ŝajnas al mi ke komenciĝas per A... la duko de Ram..." Sed malgraŭ tiu ĉi mnemoteknika sistemo, la nomo de la generalo restis kaŝita en nesondeblaj profundoj, kaj tio igis Karanfilon laŭte ekkrii:

„Mi estas stultulo kaj malsaĝulo; ĉu tiun zorgon mi havas nun?" kaj por doni kategorian neon al tiu ĉi malfavora opinio pri si mem, li denove fermis la okulojn kaj turnis sin kun la dorso al Napoleono, kiu manifestacio klare montris lian decidan intencon rompi ĉian intelektan komunikon kun li. Sed en la sekvinta momento li duonleviĝis kaj fiksis punkton el la spaco, kun videbla streĉo ...La angla heroo restis same anonima.

Karanfilo ĵetis sin en la liton, poste subite forĵetis la litkovrilon de sur si, supreniĝis kaj komencis promeni de unu ekstremaĵo de la ĉambro al alia.

„Ni vidu", diris li laŭte. „Ni komencu malrapide. Tiel..."

Kaj li komencis, kiel en la lernejo, fari al si demandojn kaj mem respondis.

— Kie estis venkita, mi petas, Napoleono? — Ĉe Waterloo. — Tre bone. Kiu venkis lin? — La duko de..."

Karanfilo haltis antaŭ la portreto de Napoleono, kiun li obstine fiksrigardis, kvazaŭ li estus volinta legi en la trajtoj de la franca heroo la nomon de lia malamiko. Sed la imperiestro staris fiere kaj ne volis lasi sin logi de la manovro de l' profesoro. Tial nia amiko denove

komencis la demandojn, promenante ekscitite en la ĉambro: „Kiu estis la venkinto de Napoleono? — La duko de..."

Tiu ĉi demando estis farata per la tuta forteco bezonata de la cirkonstancoj, kaj la respondo estis donata tiel, kvazaŭ la profesoro estus volinta surprizi neantaŭsciantan malamikon. Sed vana ankaŭ tiu artifiko.

Oni bone vidas ke la duko estis decidinta nepre amuziĝi, dum tiu nokto, en sia aera loĝejo, pri nia amiko...

Karanfilo haltis en la mezo de la ĉambro kaj diris per la plej konvinka tono: „Mi estu saĝa ... mi atendu ĝis morgaŭ ... ja ne estas tro longe ... tiam mi certe ekscios". Kaj la profesoro por finfirmigi tiun ĉi fortan decidon, denove fiksrigardis punkton el la spaco. „Kaj serioze, finfine kial interesas min lia venkinto? Prenu ilin ambaŭ la diablo! ... Nu, Karanfilo, ne estu freneza ... Al dormo!"

Vere, sekve de tiu tiel saĝa admono, Karanfilo denove enlitigis sin, fermis la okulojn kaj metis ankaŭ kusenon sur la kapon. Sed eĉ kvin minutoj ne pasis, kaj li levis la kapon dirante mallaŭte: „Katusoff, Blücher, Schwarzenberg..." Sed ankaŭ en la kompanio de siaj kunbatalintoj, la angla generalo ne volis ekaperi, kaj tio igis Karanfilon profunde enpuŝi sian kapon en la kusenon kaj malespere frapi per la piedoj, sendante al ĉiuj diabloj Napoleonon kune kun liaj malamikoj.

Li levis sin, malsekigis viŝtukon per malvarma akvo, bandaĝis sian kapon per ĝi, kaj poste komencis furioze promeni en la domo, ripetante kiel lernaĉanta knabo: „Napoleono estis venkita ĉe Waterloo... jen...

jen... Kiu venkis Napoleonon ĉe Waterloo? — La duko de ..."

Dum li tiel promenis en la ĉambro, subite feliĉeca ekbrilo lumigis lian vizaĝon kaj Karanfilo ekhaltis, dirante laŭte, kun la plej perfekta konvinko, fikse rigardante plankan fendon: „Ĉiuj homoj estas mortontaj. ... La duko de ... estas homo ... do la duko de... estas mortonta."

La leganto ne kredu ke, sub la influo de tiu ĉi fiksa ideo, la menso de nia amiko ekiris sur la kampon de l' frenezo. Ne, tute ne. Kio okazis? Li ekrememoris ke foje, delonge, li lernis en la universitato, el lernolibro pri logiko, tiun ekzemplon de silogismo, en kiu le venkinta duko estis la subjekto de la dua premiso, kaj se la historio perfidis lin en tiu malbenita nokto, li unu momenton esperis, ke almenaŭ la filozofio helpos lin....

Sed vane. Li sentis ke estos maleble dormi. Ega kapdoloro kaptis lin, doloro nerva, netolerebla. Karanfilo malfermis la fenestron kaj agrabla malvarmeto venis en la ĉambron, freŝigante lian varmegiĝintan kapon. De sur la antaŭe staranta Pleŝa monteto estis aŭdebla la susuro de la abioj. La luno lumigis la vastaĵon, kaj en ĝia lumo la portreto de Napoleono estis klare videbla sur la kontraŭa muro. Karanfilo fiksrigardis ĝin ankoraŭfoje kun la sama intenco kiel antaŭe; sed la imperiestro, kun la kapo profile turnita, kun la dekstra mano en la malfermaĵo de la veŝto kaj kun la maldekstra ĉe la dorso, videble spitis lin per sia kvieta kaj malestima mieno...

La afero komencis ekhavi por Karanfilo la propor-

ciojn de vera katastrofo. De kie li eksciu?... Kion li faru?... Tute maleble dormi... Kaj li promenis en la domo per grandaj paŝoj, parolante al si mem kaj gestumante:

„Li estis en Portugalujo. Kiu estis en Portugalujo? La duko de Brag...ne,...ĉiuj homoj estas mortontaj... Kiel mi forgesis lin?...La duko de Rag...prenu lin la diablo...".

Maleble.

Unu momenton li pensis pri la pastro Kipriano... sed ne,...estis stultaĵo,...Karanfilo mem konsciis pri tio...ĉar de kie povis scii la monaĥo la nomon de la angla generalo?

Kien iri?...Kiel ekscii? Li iros al sia amiko Vasilju ...nur li sola povos kvietigi lin. Ĝis matene estis tro longe. — Karanfilo vestis sin, surmetis la ŝuojn kaj eliris el la domo. Vasilju loĝis malproksime, en Vodiveni, sed ne gravas. Karanfilo ekiris tien...

Elirante, li vidis lumon ĉe Kipriano, kiu loĝis apude en malnova dometaĉo, kaj Karanfilo restis unu momenton enpense.

Sed puŝate de nedifinita bezono, li jam ekvidis sin interne...

La monaĥo, maljunulo proksimume okdekjara, estis preĝanta el libro. Vidante lin, li demandis sian gaston:

— Ĉu vi ankoraŭ ne kuŝigis vin?

— Jes, sed mi ne estis dormema. Mi rigardis la surmurajn bildojn.

— Jen, baldaŭ oni sonorigos je matenpreĝo, diris la monaĥo.

— Ĉu vi delonge havas la bildojn, paĉjo?

— Mi havas ilin de la pastro Joakimo.

— Vi havas ankaŭ Napoleonon. Granda imperiestro li estis...

— Eble li estis.

— Sed ĉu via moŝto scias, kontraŭ kiu li batalis?

La monaĥo rigardis lin, poste:

— Li batalis eble kontraŭ Osman Paŝa[1]).

— Sed pastra moŝto, diris malbonhumore Karanfilo, — ĉu vi scias kiun landon estris Napoleono?

— Certe. La germanan landon.

Karanfilo lasis lin al la dia volo, kaj malkuraĝigite ekiris al Vasilju.

Estis nokto el la plej helaj. De la vojeto kondukanta al la monteto, al Vodiveni, estis videbla mirinda pejzaĝo, sed Karanfilon interesis tute aliaj aferoj: „Li komandis kun Blücher ... Do, kiu komandis kun Blücher? Ĉiuj homoj estas mortontaj ... La duko de ... estas homo ..."

Vanaj ĉiuj rimedoj! Feliĉe, jam ne estis longe ĝis Vasilju.

Kiam li alvenis en Vodiveni, estis noktomezo. Granda trankvilo regis ĉiujn ĉirkaŭaĵojn. Nur la sonorado de la monaĥejo estis klare aŭdebla, jen pli mallaŭte, jen pli laŭte, kaj el la fundo de la arbaroj ĉirkaŭantaj je tri flankoj la monaĥejon, de sur la monteto alia sonorado, de iu mistera kapelo, respondis jen pli laŭte, jen pli mallaŭte.

Karanfilo frapis al la fenestro de sia amiko, vokante lin pernome.

---

[1]) Turka generalo batalinta kontraŭ la rumanoj en ilia milito por sendependeco.

— Kiu estas? — aŭdiĝis de interne.

— Mi.

— Vi estas?

— Jes. Ĉu vi dormis?

— Mi dormis, sed kial?

— Mi petas, kiel nomiĝas la angla generalo, kiu venkis Napoleonon ĉe Waterloo? La komandinto de l' batalo ...

Sekvis mallonga paŭzo, post kiu Vasilju demandis:

— Ĉu vi freneziĝis?

— Mi petas, forlasu la ŝercon, diris Karanfilo, — kaj respondu al mi.

Vasilju ne respondis, sed oni aŭdis brueton el la domo; la pordo de la koridoro malfermiĝis kaj blanke vestita persono, kun la surtuto surŝultre, aperis en la domantaŭaĵo.

— Kion vi havas, kara?

— Nenion, respondis Karanfilo, — mi forgesis la nomon de la venkinto de Napoleono, kaj mi turmentiĝas de hieraŭ vespere por ekscii, kiel li nomiĝas, kaj mi ne povas.

— Pro tio vi venis?

— Pro tio.

— Ĉu vi ne vizitis la frenezulejon? — demandis lin Vasilju tre serioze.

— Ne parolu stultaĵojn, mi petas, respondu al mi.

Vasilju pensis unu momenton, poste diris: „Mi ne memoras".

Karanfilo insistis: „Rememoru ... mi petas ... li estis duko ... duko de ... rememoru ... Li estis

la superega komandanto ĉe Waterloo ... Li batalis unue en Portugalujo. Li estis duko ..."

Vasilju ŝajnis profunde pensi. Karanfilo aldiris:

Li estas tiu, kiu diris en la ardo de l' batalo: „Ni mortu por la maljuna Anglujo!" Ĉu vi memoras?

— Ni mortu por la maljuna Anglujo?

— Jes, jes, jes, ĝoje diris Karanfilo.

Vasilju pensis sekve de tiu klarigo, dum Karanfilo haltigadis sian spiron.

— Mi ne memoras.

— Pensu ... mi petas, pensu ... li estis ministro en 1828.

— En 1828?

— Jes, en la registaro de Robert Peel.

— Metternich? diris iom malkuraĝe Vasilju.

Karanfilo ekfuriozis.

— Sed kara, ĉu Metternich estis anglo? Tiel vi konas la historion? Vi pleje hontu dirante tiajn malsaĝaĵojn, pro diablo.

Kaj granda malkuraĝo kaptis Karanfilon.

Vasilju kviete respondis:

— Aŭskultu, kara, ĉu vi venis por fari bruegon ... en la mezo de l' nokto? Nu, foriru, ĉar estas ankaŭ malvarme al mi ...

— Mi petas, diris Karanfilo ŝanĝante la tonon. Ne koleru ... pensu ankoraŭ iomete ... Ne estas Metternich ...

Vasilju pensis, efektive, sed respondis:

— Ne ... mi ne memoras.

— Vi ne memoras, aŭ vi ne scias?

— Mi ne memoras.

— Mi petas ... rememoru.

— Lasu min en paco, vi fuŝis mian dormon ... mi ne memoras. Pro diablo, ĉu vi estas freneza aŭ ĉu vi primokas min?

Kaj Vasilju eniris kaj ŝlosis la pordon ...

Karanfilo restis unu momenton enpense. Li levis la manon al la frunto kaj post tio sekvis terura vorto, plena de malbonvolo, verŝajne al la adreso de l' duko ... kiel li nomiĝas ... al kiu certe neniu anglo kaj neniu alia homo estis adresinta ĝin ĝis tiam.

Poste li malrapide ekiris malsupren, same kiel li estis veninta.

Survoje li haltis de tempo al tempo: „Ne eble... ne eble... la duko de... la duko de Mag... ne... la duko de Bag... ne, jen..." kaj li tuj senkatenigis torenton da senŝarĝigaj vortoj, kiuj envolvis same la dukon, la monaĥejon, la amikon Vasilju, speciale, kaj ĉiujn homajn aferojn ĝenerale. Poste, kvazaŭ li krius en telefonon: „Waterloo!... La duko de..."

Karanfilo alvenis hejme, ne povinte starigi iun rilaton psikologian, etimologian aŭ kronologian inter la diversaj aferoj eligitaj de li en la lumon dum tiu malbenita nokto kaj la nomo de la triumfinta duko. De ĉe la pordo li malespere ĵetis sin en la liton. Li tiel restis unu momenton, senmove, poste levis sin, malfermis la fenestron kaj promenis en la ĉambro, rigardante kun kruelega malamo Napoleonon. La imperiestro staris kviete kaj indiferente...

Poste li senvestigis sin, deprenis la ŝuojn ĵetante

ilin kien ajn kaj enigis sin sub la kovrilon tirante ĝin super la kapon. Sed subite li elsaltis el la lito kiel mordita de serpento, kaj ĵetiĝis al la kesto kiu kuŝis en la fundo de la ĉambro.

„Malsaĝulo mi estas!" laŭte kriis Karanfilo farante al si mem malestiman geston. Poste, de la kesto li kuris al la tablo, kiun li palpis, serĉante la alumetojn, regalante sin konstante per la titolo de malsaĝulo; poste li kuris al la fenestro, kie denove li faris movojn kvazaŭ li ludus sur klava muzikilo, poste li prenaĉis siajn vestaĵojn kaj tremante pro malpacienco avide serĉis en ĉiuj poŝoj. Ne trovante ankaŭ tie tion, kion li serĉis, li denove ĵetiĝis super la keston komencante malordigi ĝian internon en mallumo, trovis malgrandan kaj dikan libron, kaj regata de unu sola penso, ekrapidis eksteren, kiel rabiulo, haltigante la kuron apud stratlampo, kiu estis proksimume 200 metrojn for de lia loĝejo. Tie li malfermis libreton kaj legis ĉe la vorto Napoleono:

„Estis venkita ĉe Waterloo, la 18-an de junio, de la kunigitaj armeoj komandataj de la duko de Wellington, kaj..."

„A-ha. Bone. Prenu vin la diablo!" kriis Karanfilo, senŝarĝiĝinte. „La duko de Wellington."

Sekvis ankoraŭ unu forta vorto, adresita ekskluzive al la anglo, sed nunfoje pro kontento...

Kaj tremante pro malvarmo, kaj timante ke iu vidos lin senŝua kaj en tiu kostumo, Karanfilo rapide ekkuris reen, trankvile enlitigis sin kaj tuj endormiĝis...

LI NE ESTAS HEJME

Volis mia sorto, ke mi neniam ripozu, ĉar jen: kiam mi estis fraŭlo, mi opiniis min mastro de mia kapo kaj esperis, ke mia laboro estos: laboro kaj la ripozo: ripozo; sed ne estis eble.

Kiam mi revenis laca de la laboro kaj klinis mian kapon por ekdormeti iome, venis iu kaj malhelpis la ripozon, eĉ incitis ĝis mia kapo ekdoloris.

Mia patrino estis virino nekapabla kompreni min kaj volanta ke mi moviĝu laŭ ŝia plaĉo. Kaj ĉiam estis iu gapulo kiu kroĉiĝis al mia kapo kiel la malsano al sana homo. Ĉiam same:

— Ĉu Nikolao estas hejme?

— Hejme.

— Kion li faras?

— Li revenis laca kaj ekdormetis iome.

Sed la gapuloj ne respektis mian rajton je ripozo;

tra ilia kapo eĉ ne pasis la ideo, ke ili devus lasi min iom ripozi, sed ili venadis torente en la domon, sur min.

Kelkfoje mi maldormis, sed mi ŝajnigis dormon, fermante la okulojn kaj ronkblovante kiel la dormantoj.

Sed tio ne helpis. Gapulo alpaŝis, metis la manojn sur miajn ŝultrojn kaj komencis skuadi, kriante: „He, vi, jam leviĝu, kial tia dormado? ...

— Ĉuu?! Kaj mi imitadis dormanton kaj ekĝemetis kolere, turnante min sur la alian flankon, por ke li kredu ke la dormo estas al mi dolĉa kaj lasu min en paco. Sed tiu daŭrigadis:

— He, vi! Leviĝu, ĉar vi malsaniĝos pro dormado, ĉu vi ne vidas, ke estas labortempo nun?

Mi silentadis enpensiĝinta, — kion fari? Al unu mi iam saltis kaj ekbatis lin.

— Ve-e! ..

— E-e! ..

— Frato!

— For! Kaj mi tuŝis pugne, vangofrapis, kontuzegis.

— Pardonu, frato, ĉar estas mi!

— Ĉu vi? ... Aaaa! ... jen, mi sonĝis, ke mi batalas kontraŭ la Turkoj! .. Gardu Dio homon dormantan kun sonĝoj nebulaj! ...

Jes, sed mi ne ĉiam povis fari same.

Estis homoj, kiuj, kvankam kun malforta cerbo, estis utilaj al mi, kaj mi do devis konduti honeste kaj kun granda pacienco. Al tiuj mi leviĝadis kolere:

— Kio al vi?

— Diablo!
— Kial?
— Tial.
— Ĉu viaj bovoj ne estas ĉiuj hejme*)?
— Ne.
— Mi venis por ke vi faru al mi jenan laboron.
— Mi ne faras.
— Kial?
— Mankas tempo.
— Ĉu al mi . . . ?
— Al vi!
— Tiel?
— Tiel!

Kaj mi montris malafablan mienon.

— Nu, nu . . . elreviĝu, ĉar estas mi, mi . . . Tiu!

Kaj mi enpense pesadis la utilojn de la amikeco kun li, la malutilojn de lia malamikeco kaj... mi komencis rideti.

— Bone, karulo, kia vi estas?. . . Ĉu mi rajtas en mia domo ĝui neniom da ripozo? . . Se mi ion ŝuldas al vi, iru al la juĝejo, sed ĝis tiam lasu al mi pacon. Se mi ion ŝtelis: pruvu, sed ĝis tiam lasu min ekdormeti!

— Nu, nu! La dormo ne estas sana . . . Vivu, ĉar vi sufiĉe dormados post la morto... Nun estas tempo por labori . . .

— Labori, labori! . . Dio laboris ses tagojn kaj de tiam li ripozadas kaj tute ne enuas pro la ripozo,

*) t.e. "ĉu io mankas al vi"?

kaj mi, mi devas ĉiam laboradi... Pardonu, sed bonvolu ĉesigi la konsiladon!..

Sed kiom ajn mi estus paroladinta, mi ne povis penetrigi la komprenon en la kapojn de tiuj, kiuj venadis por malhelpi mian dormeton. Mi vidis, ke pli facile mi sukcesus porti akvon per korbeto, ol enigi juĝkapablon en la kapojn de la malsaĝuloj nekomprenantaj mian rajton je ripozo.

Ĉar mi ĉiam diris: gardu min Dio de la malsaĝuloj, — sed la sorto nur tiajn homojn sendis al mi, kaj kun ili mi devis aferadi.

Tiel mi fartis dum mi estis fraŭlo. Mia patrino ne komprenis min kaj ŝi opiniis ke ŝiaj patrinaj rajtoj estas tiel grandaj, ke ŝi turmentu min permesante al ĉiu malsaĝulo alkuri kaj maldormigi min.

Kiam mi edziĝis, mia unua zorgo estis, inter aliaj, iom lecioni al mia edzino. Mi diris:

— Mario, vi, ĉu vi vidas min? Tia mi estas! Mi konas la kampajn laborojn, mi konas la ĉarmetion, barelfaradon, ĉarpentarton, lignaĵarton, masonaĵon, ĉion. Ĉion mi faros, por ke ni vivu. Mi estas bonulo por la bonuloj kaj diablo por la diabluloj. Vi obeu min senkondiĉe, jen estas mia unua ordono. En la mondo havu du mastrojn: Dion en la ĉielo kaj min sur la tero! Al li preĝu sesfoje tage kaj vi pagis vian ŝuldatan dankon pro la vivo ĉi-tiea; mian parolon vi obeu ĉiuminute. Vian tutan mondan zorgon al mi dediĉu! Kiam vi ornamos vin, por mi vin ornamu; kiam vi ridetos, por mi ridetu kaj kiam vi laboros, por mi, por vi kaj por niaj infanoj laboru! Klopodu obei miajn vortojn pro

la forto de miaj paroloj kaj ne pro la fortikeco de mia bastonego, por ke vin gardu Dio, ke vi vidu kiel mi batas. Mi batas, Manjo, karulino, ke sekiĝas la karno, — ĝis vi submetas vin aŭ foriras en la mondon kun ŝvelintaj okuloj.

Kaj ankaŭ tion memoru: kiam mi venos laca kaj volos iomete ekdormi, se demandas iu pri mi, ne diru ke mi estas hejme. Diru ke mi estas for, ien, eĉ en la alian mondon, nur ne donu okazon al la malsaĝulo veni kaj malhelpi mian ripozon; ĉar tion mi ne sukcesis havi ĝis nun.

Jen venas iu kaj demandas:

— Ĉu li estas hejme?

— Ne estas.

— Kie li estas?

— Li estas en tiu loko, — kaj vi nomas rapide iun lokon, laŭplaĉe, sed vi eldemandas lin: „Kion vi volas?" Kaj se la utilo de li alportita estas granda, vi ŝajnigas, kvazaŭ ekbruliĝas la manĝaĵo kaj vi eniras, vidas ĉu mi dormas, kaj se mi ne sukcesis ekdormi, vi flustras al mi zorgete: Tio kaj tio estas... Se mi diras, ke vi voku lin, voku lin kaj mi senkulpigas vin pro ke vi mensogis. Sed se la utilo estas eta, du-tri-lea*), ne veku min, ĉar mia ripozo estas vivo, estas laborforto, estas la akvo kolektiĝanta ĉe la malsuprenlasita baraĵo, por turni la muelŝtonon kiam tiu estos levita. Do ne sendu sur min ĉiun senkapulon. Memoru ĉion-ĉi kaj laŭe agu, por ke estu bone por vi kaj por mi; alie estos malbone, Manjo, karulino.

*) leo = rumana monunuo

Mario aŭskultis min tiam iom tremanta kaj mi kredis, ke nun mi trovis iun, kiu gardos mian dormeton... Sed ne!

* * *

Pasis tri monatoj de la edziĝo.

Mario estis mia gardistino. Ŝi kondutis ĝuste kiel mi pensis kaj diris al ŝi. De miaj paroloj ŝi eĉ unu colon ne deflankiĝis. Mi ĝojadis, kaj kutime post intensa laboro mi ekdormetis, por poste leviĝi denove kun laboremego. Ĉar mia naturo estas alia. Kiam mi laboras, mi laboras ĝis laciĝo; kiam mi haltas, mi devas dormeti. Kial?... Mi ne scias, sed mi sentas ke tiel bonas por mi kaj tiel mi faras. La plej multaj movas sin la tutan tagon, malrapide, laboras kiel malsanuloj, trenas sin eluzitaj kaj senfortaj... Kiam mi metas la manon sur ion, mi sentas, ke mi metis ĝin... Mi pensis: mi prenis edzinon laŭ mia korŝato!.. Sed iutage, venis iu, — mi ne nomas lin, kvankam mi opinias, ke vi aŭdis pri lia sperto.

— Ĉu hejme kuzeto Nikolao?

— Ne, li iris Arĝeŝon.

— De multa tempo?

— Antaŭ kelkaj momentoj li foriris.

— Vian bopatrinon mi vidis ĉe la kanabo...

— Jes, ŝi ankaŭ estas tie.

— Ĉu vi restis soleta?

— Jes, sed li revenos...

Mi estis en la domo, preskaŭ ekdormetis, sed

aŭdante parolojn, mi levis min atente kaj ekaŭskultis.

Mia nomita kuzo denove komencis:

— Ĉu vi ne enuas sola, se li estas ĉiam for, ĉiam for?

— Mi ne enuas... ĉar li revenos... sed kion vi havas kun li?

— Grandan aferon...

— Diru tion al mi, ke mi diru al li, kiam li revenos.

— Ne direbla...

Kaj li haltis, tremante, apud ŝi. Ŝi komprenis kial li flaviĝis kaj kion li estis faronta. Ŝi malfermis la vestiblan pordon por vidi ĉu mi dormas, kaj ĉu mi ne aŭdos kion laŭ ŝia kompreno li estis ekdironta. Mi fermis la okulojn, malfermis la buŝon kaj spirblovis kiel la sonĝantaj dormantoj. Ŝi estis ferminta la doman pordon, por ke li ne vidu min en la lito. Sed li, opiniante, ke en la domo estas bona amokazo, rapidis en la vestiblon post ŝi.

— Vere, li ne estas, flustris ŝi. Foriru!...

— Manjo! — li komencis. Ĉu vi memoras, kiam mi prenis vian naztukon, tiam, kiam mi postiradis vin, kiel post homo la ombro?

— Foriru! Iru! For!... Kaj ŝi ekkuris en la mezon de la korto, por ke li ne brakumu ŝin en la vestiblo kaj mi aŭdu kaj vekiĝu. Li sekvis ŝin ruĝiĝinta.

— Ĉu vi ne plu ametas min?... Ĉu mi ne estas sama kiel antaŭe? Kial vi tiel kuras?... Ni estas solaj kaj neniu vidas nin...

— For! Iru! For!... kaj ŝi tremadis kaj evitadis lin; sed li rapidis, kaptis kaj komencis kisi kaj brakumi

ŝin. Mi elsaltis el la lito kaj ekkaptis seĝeton. Kiel ventego mi ĵetegis min el la domo. Kiam li vidis min, li flaviĝis kaj restis senmova kiel lignopeco.

— Frato!...

Sed mi per unu frapo lin amasigis tere...

— Vi mortigas min!...

— Foriĝos via ŝato al mia edzino!

Kaj mi komencis frapadi kien ajn.

Mia Mario forkuris terurigita. Li komencis petadi:

— Vi mortigos min, pardonu al mi, frato!...

— Paciencu iome, frateto!... Kaj mi turnadis lin, kiel feron sur la amboso. Ju pli mi frapis, des pli mi frapemis; ju pli mi vidis lin mola, kun la vizaĝo kontuzita kaj sangoplena, kiel besto kiu okule vin fulmas, sed ne plu havas la forton vin ŝiri, des pli kore mi frapis.

Fine li estis mola karnamaso disetendita sur la tero. Tiam mi ankaŭ rimarkis Marion, kiu kroĉiĝis al miaj manoj:

— Kion vi faris, Nikolao, ĉu vi mortigis lin?...

— Mi mortigis lin!...

Kaj mi ekemis ankaŭ ŝin mortofrapi. Mi fermis la okulojn kaj frapis... Kien?... Kien falis la seĝo! Kiam mi rigardis, ŝi ankaŭ kuŝis sur la tero.

Mi do mortigis ŝin; mi timtremis!... Momente mi ekvidis la ĝendarmojn antaŭ mi; la soldatajn bajonetojn kaj la nigran tablon de la juĝejo! Mi rigardis terurigita ĉiudirekten. Mia kapo eksvenis, zumkantis, — mi plu nenion aŭdis. Mi ekpensis: ke mi forportu la mortigiton el mia korto. Mi prenis lin per la brakoj kaj levis lin. Li estis ankoraŭ mola.

Ĝemeto glitis tra liaj lipoj. Li ne mortis ankoraŭ, pensis mi... Ĉe la pordo, li komencis: „Ne veku min, panjo, estas tiel bela tiu-ĉi sonĝo!"... Mi ekhaltis... Kiel do, ĉu li endormiĝis pro la batoj?... Mi denove ekpensis, kien lin porti... Mia najbaro havis maizkampon. Mi alkuris kun li en la maizon. Li malfermis la okulojn kaj demandis min: "ĉu estas vi, Nikolao?" Mi silentis.

Li fermis la okulojn, sed poste remalfermis ilin terurigita.

— Pardonu al mi, ne mortigu min tute!... Vi ankaŭ estas homo! Kompatu, ĉar vi ankaŭ eraras kaj eraris... Ne mortigu min!...

Mi lasis lin tie kaj reiris hejmen... Mi pensis, ke li pravas... la homo eraras kaj devas pardoni al alia homo. Se ne ekzistus eraroj, oni havus nenion por pardoni; sed tiel... Mario penadis por leviĝi!..

Mi rekonsciiĝis: mi mortigis neniun, kaj mi ĝojis.

— Ĉu vi ankoraŭ permesos, ke oni kisu vin, Mario?

— Vi mortigis min, Nikolao!

— Mi iom lecionis al vi, karulino.

— Tion vi opinias, sed tio estas mortigo, ne leciono, Nikolao!

Mi portis ŝin en la domon. Kaj jen, mi ne scias kial...

Kiam mi vidis ŝin kun plorintaj okuloj, kun la haroj malplektitaj, kun la sino malkovrita kaj neĝblanka, beleco kiun mi preskaŭ igis kadavro, mi ekploremis!... Kial mi detruu korpon plej belan?... Ĉar Mario estis kaj estas ankoraŭ kara al mi... Kaj mi disŝiru ŝin, ĉar

iu alia ŝin kisis tial, ke ŝi ankaŭ al li estis kara?

Mi ege pentis. Mi plej zorge vartis ŝin.

Ŝi malsanis dum unu semajno.

Tiam mi diris al mi: mi ne plu batu ŝin, ĉar monda peko aŭ ago nia estas ĉiam ĉio ĉi!... Do kian malbonon ŝi faras, se ŝi ridetas al aliu, kiel mi avidas alian?... Kaj se ŝi plezure akceptas kison, estas same kiel mi ĝojas, kiam iu alia kisas min.

Ŝia nura kulpo estis, ke ŝi ne forskuis lin per vortoj malmildaj; sed, se ŝi ne volis tion?... Ĉar la koro havas kvar ĉambretojn, en kiuj multaj ioj estas kaŝitaj.

* *
*

De tiam ŝajnis al mi, ke Manjo saĝiĝis.

Al ĉiu ŝi diris, ke mi ne estas hejme, sed la plej multaj ne kredis ŝin kaj eniris en la domon ridante. Ŝi restadis ekstere. Kio do povus esti tio?... Ĉu mia rajto je ripozo denove iĝis mokaĵo por ĉiu?

Iutage mi vidis strangaĵon.

Iu demandis ŝin:

— Ĉu li estas hejme?

— Tute ne.

— Sed kie li estas?

— Mi ne scias.

— Kiel, ĉu vin ne interesas tio?

— Jes, tamen!

— Do, kie li estas?

— Mi ne scias!

Tiu komencis ridi. Mi rimarkis, ke ŝi faris iajn

strangegajn signojn. Per la maldekstra mano ŝi faris signon ke ne eblas kaj per la dekstra mano ŝi signis, ke mi estas en la domo, por ke tiu ne ekparolu stultaĵon.

Mi ankaŭ ekridis; sed mi komprenis nun, kial ĉiuj venadis ridante al mi en la domon...

— He, vi! Via edzino mensogas ke vi ne estas hejme... Sed mi ne kredis ŝin kaj jen eniris...

— Ulo, vi, diru, ĉu mi ne estas mastro en mia domo?...

— Kio do, ĉu ne sufiĉas por vi la nokto?... Leviĝu, ĉar vi malvigliĝos, malsaniĝos, vere!

Kaj jen, mi nun spertas la samon, kion mi spertis kiam mi estis fraŭlo: ĉiu frenezulo rajtas malhelpi mian dormon.

— Kara, kial vi diras, ke mi estas hejme?

— Ne estas vere...

— Ne mensogu, ne estu ruza!...

— Ja, Nikolao, la avara mastro instruas la serviston ŝteli, kaj kiu batas pro la vero devas esti mensogata...

Do, diru al mi, nun, ĉu mi havas, jes aŭ ne, rajton ripozi?... Mi rezignos je ĉia laboro, se mi iam riĉiĝos!..

— Ne tro esperu! — respondis al li iu.

Nikolao gratis sian nukon kaj rediris:

— Tio vere tiel estas; ĉar ankaŭ per la laboro oni hodiaŭ ne plu riĉiĝas!... Sed diru, ĉu mi rajtas neniom da ripozo ĝui, kiam mi bezonas?

ENHAVO

Antaŭparolo 3

I. L. CARAGEALE: Du Lotbiletoj 5

I. CREANGA: Oĉjo Johano Rado 28

A. DE HERZ: La Staciestro 33

D. D. PATRASCANU: La venkinto de Napoleono 41

I. C. VISARION: Li ne estas hejme 52

La nomoj de la verkintoj devas esti tiel elparolataj:

CARAGEALE	=	KARAĜALE
CREANGA	=	KREANGA
DE HERZ	=	DE HERC
PATRASCANU	=	PATRAŜKANU
VISARION	=	VISARI-ON'

EL LA RUMANA LITERATURO

aperis

el la lerta plumo de la talenta tradukisto

TIBERIO MORARIU

— jenaj tri legindaj volumoj : —

BRATESCU - VOINESTI : NIĈJO MENSOGULO

EMIL ISAC: SONORILO KAJ KANONO

SADOVEANU : NOBELA PEKO

Legu tiujn tre karakterizajn kaj diversnuancajn librojn por pli proksime konatiĝi, pere de Esperanto, kun la rumana animo.

Mendu ilin tuj ĉe iu pli granda Esperanta librovendejo!

Rumana bonhumoro en ...

4,99 lei

Alte limbi straine

19,5

PRESEJO „GELDERLAND"
ARNHEM (NEDERLANDO)